

la Espero

1991:4

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN



**Kongreso inter maro
kaj montaro**

ANONCETOJ

Faldfolion pri Nacia Esperanto-Muzeo en Gray, Francio, oni povas mendi de la urba turisma oficejo: *Bureau Municipal du Tourisme, B.P. 89, F-70100 Gray, Francio.*

Aperis turisma broŝuro en esperanto pri la dana urbo Næstved. Mendu ĝin de: *Næstved Turistkontor, Købmagergade 20 A, DK-4700 Næstved, Danio.*

En 1992 Unuiĝintaj Nacioj organizos en Brazilo grandan mondkonferencon pri **Ekologio**, nomatan EKO-92. Asocio Esperantista Rio de Janeiro profitos tiun okazon por klopodi organizi profesi-nivelan ekspozicion pri infan-desegnaĵoj. La temo estas laŭvola, sed oni proponas tiujn lititajn al ekologio, vivmaniero ktp. Rajtas partopreni ĉiuj infanoj ĝis 12-jaraj. Sendu viajn kontribuojn sur bona papero ĉirkaŭ la grandeco de 20 cm x 30 cm al: *AERĴ, Caixa Postal 840, BR 20001 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo.*

Deziras korespondi:

Soveta katoliko volas havi kontakton kun religia organizaĵo kaj lerni la svedan lingvon: *g. Rostov-na-Donu 344010, pr Sokolovo, d 85/2, kv 126, Ŝirokov, Vladimir Petroviĉ, Sovet-Unio.*

Kvardekjara polino pri politiko, historio, libroj, klasika muziko ktp: *Alina Czyz, ul. Pstrowskiego 5/18, PL-35-041 Rzeszów, Pollando.*

Pola 44-jara instruisto volas inviti familiojn aŭ grupojn: *Jacek Suchocki, PL-43-100 Tychy, Pl. Pstrowskiego 70 w 6, Pollando.*

DONACOJ

David Victor, Göteborg 75. Sven Österberg, Växjö 200. Sundsvalls Esperantoförening 500. Claes Göran Ingestedt, Vällingby 300. Kumla Esperantoförening 3538:40. Gabriella Sandström, Bromma 39. K E Sterner, Ljungskile 100. Väinö Ölund, Eskilstuna 205.

Daŭrigo sur paĝo 61

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Sättning: Leif Nordenstorm, Per Aarne Fritzon

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: BodoniTryck AB, Stockholm 1991

Prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08 -11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1991: Direktansluten medlem 125 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen, tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby, tel. 0760-882 10

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87

Suppleant: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08 - 97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september - 15 maj; torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala

Enhavo

- 50 Anoncetoj
- 50 Donacoj
- 51 Redaktanto
- 52 76-a UK: 2295 esperantistoj en belega norvega urbo
- 53 Du svedoj fariĝis honoraj membroj de UEA
- 54 Ulla Luin: sekretario kaj ideologo
- 56 Esperanto kaj komerco
- 57 Junularkongreso en Karlskoga
- 58 Krucvortenigmo
- 59 Temo: La mondaj religioj
- 60 Por komencantoj: Agado E3
- 61 Pri esperanto en Nationalencyklopedin
- 61 Televizio, radi- kaj magnetofonie en Västerås
- 61 Solidarservo en Kungälv
- 61 Klubo Cent kaj Mil
- 61 Ingen skatt på bamkränta
- 61 Esperanto 100 år i Göteborg
- 62 UMEA-kuracejo en Pollando
- 62 Unu organizaĵo en Germanio
- 62 Rekordo en Jyväskylä
- 62 Nia lingvo
- 63 Recenzoj
- 63 Kalendaro

Redaktanto:

La Espero estos pli bela, kaj pli multekosta...

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio en sia kunveno la 8-an de septembro decidis ne plu uzi la presilon, per kiu estis presita La Espero dum preskaŭ dek jaroj. La presilo sitempe estis bona investo. Per ĝi ni ŝparis multe da mono. Ni danku ankaŭ al Milorad Ljubisavljević, kiu uzis multan tempon por presi la revuon.

Tamen la presilo nun ne plu povas presi belan revuon. Precipe la bildoj ne fariĝas belaj. Ĉar La Espero estas grava kiel vizaĝo de la sveda esperanto-movado, estas grave, ke la revuo estu bela. Multaj membroj jam dum kelka tempo proponis, ke ni presu la revuon en profesia presejo. Tiel ni nun faros, kvankam tio


forte ŝarĝos la buĝeton de SEF.

Por faciligi la ŝanĝigon La Espero aperos per duobla numero 5-6 ĉijare. La limdato estos la 18-a de oktobro.

Tanzanio – ĝemela asocio

La estraro ankaŭ decidis, ke SEF akceptas Tanzanian Esperanto-Asociacion kiel ĝemelan asociacion. Ni subtenos la tanzanian esperanto-agadon per mono. TEA nun bezonas ejon en la ĉefurbo Dar-es-Salaam. Ni nur povas ĝoji, ke esperanto nun bone progresas en Afriko.

Leif Nordenstorm
redaktanto de La Espero



76-a UK: 2295 esperantistoj en belega norvega urbo

La ĉi-jara 76-a Universala Kongreso de Esperanto okazis inter la 27-a de julio kaj la 3-a de aŭgusto en la belega Bergen en Norvegio. Ĝi allogis 2295 partoprenantojn en 54 landoj. Ne nur la urbo mem estas alloga pro sia pitoresko, sed ankaŭ la ĉirkaŭanta naturo estas mirinda. Bergen estis bona urbo por esperanto-kongreso ankaŭ pro la kialo, ke la UK estis la plej granda internacia kongreso iam okazinta en la urbo. Pro tio la kongreso estis bone konata inter la urbanoj. Post la semajno ĉiuj sciis, kio estas esperanto.

Ĉu spiona ŝipo?

Publikecon donis ankaŭ litova ŝipo kun litovaj kaj rusaj esperantistoj



Elna Matland estis la motoro de la esperantokongreso de Bergen, tie ĉi kune kun Franko Luin el Svedio. (Fotis U Luin)

kaj neesperantistaj turistoj, kiuj laŭplane devus resti en la haveno dum la semajno, sed kiu ne ricevis permeson tion fari, ĉar laŭ iuj informoj ĝi antaŭe estis spiona ŝipo. Post kelkaj tagoj da atendo, la Bergen-a komercista asocio invitis la litovajn kaj rusajn ŝipanojn resti en la urbo je la kosto de la asocio, sed la ŝipo devis resti surmare. Tiu ĉi malagraba afero tamen donis multajn gazetarajn titolojn pri la kongreso.

Bunta programo

La programo estis tre bunta. Okazis prelegoj i.a. pri geologio, lingvo kaj literaturo, ekspozicio pri laponoj, ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Bergen kaj kurso pri la norvega lingvo.

Kongresa universitato

La kongresa universitato prezentis prelegojn pri inter alie oceanologio (Ralph Lewin, Usono), literaturo, (Odd Tangerud, Norvegio), astronomio (Kiril Velkov, Bulgario), medicino (Rokuro Makabe, Japanio), ekonomio (Bengt-Arne Wikström, Svedio), angla literaturo (Marjorie Boulton, Anglio) kaj islanda lingvopolitiko (Baldur Ragnarsson, Islando). Gvidis la prelegserion Carl

Støp-Bowitz, Norvegio, kiu ankaŭ prelegis pri zoologio.

Kulturo

Norvegaj artistoj prezentis norvegan kulturon. La amatora teatrogrupo "Kia koincido", kun membroj el Germanio, Nederlando kaj Anglio, prezentis "Puphejmon" de Henrik Ibsen. Oni ankaŭ prezentis la filmon "Reen al Finnlando", dokumentaĵo en finna, pola kaj esperan-

ta originalo. Ĝi temas pri militkaptitejo en norda Finnlando kaj estis reĝisorita de Roman Dobrzynski. La filmon antaŭe montris finna kaj pola televido. En "La tago de la libro" verkistoj kaj eldonejoj prezentis novajn verkojn. Instruistoj organizis "La tagon de la lernejo" kaj Eva Nordland prelegis pri mediaj demandoj en "La tago de la paco".

Belartaj konkursoj disdonis siajn premiojn. La premio por plej bona infanlibro estis aljuĝita al "Divenado, kion mi faras" el Japanio. Svedio ricevis trian premion por videobendigo de la pupteatraĵo de "Vivo de Zamenhof". Manuskripto: Lars Forsman; Reĝisorado kaj surscenigo: Anne-Sofie Robinson. Voĉoj: EKO, Esperantoklubo de Karlskoga. Filmo: Sven-Erik Stjernman.

La komitato

La komitatkunsidoj ĉi-jare komenciĝis sabate posttagmeze kaj finiĝis vendrede en la kongresa semajno. Do, la kunsidoj ne estis lokitaj multe ekster la kongresa kadro. Tio estis iom malavantaĝe, ĉar estis malfacile por la komitatoj sekvi aliajn programerojn, kiuj okazis samtempe.

Grava demando ĉi-jare estis kiel aranĝi la pagojn de kotizoj por membroj el la antaŭa "Orient-Eŭropo", kie nuntempe mankas valoro por pagi por ĉiuj membroj. Ne eblis nun trovi solvon, sed urĝas, ke la estraro trovos eblecon por ne perdi milojn da membroj. La financoj de UEA ĝuste pro tiu valutproblemo estas tre malfortaj kaj kiel ordinare estis iom akra debato pri tiu temo.

Estis elektitaj kelkaj novaj honoraj membroj, i.a. Jan Strønne kaj Karl Söderberg el Svedio. Nova aliĝinta fakorganizo estas ASISTI, Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj kun Joŝimi Umeda kiel prezidanto. Sed ankaŭ ĉi-jare la aliĝpeto de Monda Turismo ne estis akceptita.



En la infankongreso de Bergen partoprenis kelkdeko da infanoj ĝis 12-jaraj, pluraj helpantoj iomete pli aĝaj, kaj kompetentaj gvidantoj el diversaj landoj. (Fotis U Luin)

Dum la kongresa semajno laboris pluraj laborgrupoj pri diversaj temoj, i.a. pri la nova ĝenerala regularo. Ĝi estis akceptita de la komitato.

Nordio – ĉu modelo?

Tio estis la kongresa temo kaj ĉirkaŭ ĝi estis serio da prelegoj kun Baldur Ragnarsson kiel kunordiganto. Estis ok duonhoraj prelegoj kun postaj diskutoj pri la kunlaboro en Nordio. La temaro estis tre larĝa. Baldur Ragnarsson enkondukis kaj gvidis la tuton, sed ankaŭ donis superrigardon pri la kultura kunlaboro en Nordio. P.J. Krogstie kaj F.A. Høeg el Norvegio parolis pri respektive turismo/trafiko kaj leĝodonado. Anna Ritamäki, Sakari Kauppinen kaj Sabira Ståhlberg el Finnlando donis orientiĝon pri junularaj de-

mandoj, esploroj kaj edukado. Märtha Andréasson, Svedio, raportis pri la medioprotektado en Nordio.

En pluraj debatoj envenis la aktuala demando pri la sveda peto pri membriĝo en EK (Eŭropa Komunumo). G. Maertens, Belgio, i.a. iom atakis Svedion, ĉar oni cedis pri sia lingvo petante membriĝon en EK. Tio estas kontraŭ la traktato de Romo kaj minaco kontraŭ la nunaj reguloj.

Tago de la paco

Mark Fettes gvidis la Tagon de la paco kun helpo de Douglas Draper. Enkondukis ĝin Eva Nordland de la norvega pacmovado, unu el la iniciintoj de la societo, kiu laboras kontraŭ la atomarmiloj kaj ankaŭ unu el la iniciintoj de la pacmarŝoj tra Eŭropo antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi vigle


rakontis pri sia paclaboro kaj ankaŭ pri sia nuna laboro instrui al infanoj pacan pensadon. Ni lernu vidi "la duoblan komunikadon" – oni parolas belajn vortojn sed faras abomenajn agojn. Ankaŭ estas grave, ke infanoj helpu solvi problemojn en sia regiono, en sia lando kaj en la tuta mondo, ĉar ili havas grandan povon kaj potencon. I.a. ekzistas UNESKO-lernejoj, kiuj laboras laŭ tiu principo.

UNESKO-asocio fondita

Dudek kvin personoj sin anoncis al nova esperantista UNESKO-asocio "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo". En la kunsido Ida Blom, reprezentanto de la norvega UNESKO-komisiono, rakontis pri la UNESKO-laboro en Novegjo.

*Märtha Andréasson,
Per Aarne Fritzson kaj aliaj*

Du svedoj honoraj membroj de UEA




La komitato de UEA elektis du svedajn honorajn membrojn, nome Jan Strönne (sur la bildo) el Malmö, kaj Karl Söderberg el Uppsala. (Fotis U Luin)

Ĉu vi volas legi pli pri la kongreso en Bergen?

Sufiĉas sendi poŝtkarton al la redakcio de Heroldo de Esperanto, Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (To), Italio, por senpage ricevi ekzempleron de la duobla numero de la gazeto kun ilustrita raporto pri la UK en Bergen.

Kiel ĉiuj scias, la grand-formata Heroldo de Esperanto, fondita en 1920, de pli ol 70 jaroj estas la plej ofte aperanta internacia periodaĵo en esperanto.

Ulla Luin: sekretario kaj ideologo



Mezaĝulino ŝi verŝajne nun estas, Ulla Luin, lerninte esperanton kiel 17-jarulo antaŭ proksimume 30 jaroj. "Ĝismedola esperantisto" oni povas diri, ĉar ambaŭ ŝiaj gepatroj estis vere aktivaj movadanoj. La patro, Jan Strönné, dum multaj jaroj estis la prezidanto de SEF, la patrino prizorgis la libroservon de Eldona Societo Esperanto.

– Sed vi ne estis denaska esperantisto, ĉu? Ambaŭ viaj gepatroj estas svedoj, ĉu ne?

– Skanianoj, jes!

Ulla do venas de la sudo, naskiĝis en Malmö. Tie, en la junulara esperantista studrondo, la loka JES, ŝi renkontis Franko Luin. En 1967, post ilia geedziĝo, ili translokiĝis al Stokholmo. Ulla tiam studis, estas nun ekonomo kaj laboras por eldonejo. Eĉ se ŝi mem ne estas "denas-

ka", Franko kaj ŝi nun havas filon, Janko, kiu estas denaska esperantisto. T.e. li lernis esperanton jam dekomence, kiel infaneto. Dum Ulla parolis al li svede, Franko nur parolis esperante.

– Ĉu esperanto funkcias en tia situacio?

– Jes, same bone kiel iu ajn dua lingvo.

La orbito

La Ulla-a orbito kiel movadaktiva verdulino transiris de SEJU al TEJO, kie ŝi dum ioma tempo estis la kasisisto. Ulla kaj Franko ankaŭ estis la motoroj malantaŭ la organizado de la Internacia Junulara Kongreso en Tyresö 1969.

– Estis la unua fojo ke oni dum TEJO-kongreso diskutis sociajn kaj politikajn demandojn.

Dum tiu kongreso estis aprobata la grava "deklaracio de Tyresö", redefinanta la signifon de "neŭtraleco" por TEJO:

– Neŭtrala ne signifas eviti paroli pri ĉio, sed paroli pri ĉio!

– Permesi ĉiujn vidpunktojn, ĉu?

– Jes. La deklaracio ankaŭ diris, ke la esperantomovado devas malfermi sin al agado kun aliaj movadoj en la mondo.

– Ĉu estis mejloŝtono en la evoluo de TEJO?

– Fakte jes. Kaj ĝi estis tre kritikata en la esperantomovado tiutempe.

Ej-mona problemo

Nun Ulla Luin estraranas en SEF kiel ĝia sekretario kaj respondeculo por Esperanto-Centro en Brunnsgratan 21. Tiu tasko estas iom peza, ne nur pro la malfacileco funkciigi la deĵoradon tie, sed precipe pro la ekonomia situacio.

– La lukotizo nun altiĝas per 60%, ĝis 100 000 kronoj poĵare. Tio tamen ne estas multe, kompare kun aliaj ejoj en Stokholmo. Laŭ Ulla ne estas realisme trovi alian, malpli kostan, ejon.

– Sed kion fari? Centmil kronoj ĉiujare – estas multege da mono! Ni devas trovi monon... iel.

Do, jen momente estas "problemeto". La espero de Ulla estas, ke ni trovos subtenanton, t.e. firmaon, kiu pagos unumonatan lukotizon por ni, rekompence ricevante iom da reklamo.

Oni ankaŭ ne forgesu, ke la ejo estas uzata plurmaniere, i.a. kiel presejo de La Espero, kiu aliokaze kostus multe pli.

De amuzajo ĝis trapensita ideo

– Ĉu vi vidas la argumentojn por esperanto alimaniere nun ol kiel ekverdulo?

– Kiam mi komencis, esperanto estis amuzajo nur. Sed ĉirkaŭ la jaro 1968 mi kaj Franko komencis serioze diskuti, kion ni volas pri esperanto, ĉu tio estas subteninda ideo. Nun esperanto havas tute alian signifon por mi.

– Kaj pli ekzakte...

– Temas pri la rajto de iu ajn ko-

muniki je facila nivelo...La egalaj rajtoj de ĉiuj je dua lingvo, kiu ne apartenas al speciala popolo sed al la tuta homaro.

– Ĉu vi kredas je "La fina venko"?

– Dependas de la homoj. Mi ne estas kredanto. Ne venos de la ĉielo, sed se sufiĉe da homoj laboras por ĝi... eblas. Estas ebla solvo de la lingvaj problemoj, dumtempe esperanto estas amuza, uzebla, donas eblecojn, kiujn aliaj lingvoj ne donas... Ĉi donas senton de internacieco.

– Donas ion jam hodiaŭ, ĉu?

– Jes.

Niaj problemoj

Demandita pri problemoj en la laboro, Ulla revenas al la ekonomia flanko:

– Manko de mono kaj manko de tempo.

– Kaj kion fari? Ĉu troviĝas bona rimedo?

– La afero estas, ke por havi pli da homoj ni bezonas pli da mono. Kaj por havi pli da mono ni bezonas pli da homoj.

Ĉar aktuala debato en la stokholma klubo estas, ĉu oni devas sin tute dediĉi al interna laboro, aŭ ĉu oni povas ankaŭ provi varbi novulojn, Ulla estas petita komenti je tio:

– Ĉiuj homoj, kiuj aktivis pri esperanto, faras tion je siaj propraj kondiĉoj. Se iu homo opinias, ke estas amuze dediĉi sin al interna laboro estas superflue diri, ke tiu homo ne dediĉu sin al tio, sed dediĉu sin al ekstera laboro, ĉar en tiu kazo tiu homo faras nenion. Do, oni dediĉu sin al tio, kio estas interesa al tiuj, kiuj estas aktivaj en la momento.

– Ne devas esti tasko por la esperanto-movado teni esperanton kiel sia propra sekreto, ĉu?

– Kompreneble ne, tio ne estas tasko. El mia vidpunkto estas tre bone, se oni povas direkti sin al ekstero. Laŭ mia kompreno la stokholma klubo ankaŭ tiel laboras. Ĉiuokaze oni ja devas doni la liberecon al tiuj, kiuj volas iri eksteren.

– Devas esti loko por ĉiuj en la agado, ĉu?

– Tio estas tre grava punkto.

Jan Milld



Vizitu la belan interesan

TAJLANDON

- akceptas grupojn grandajn, malgrandajn
- kulturaj programoj
- vizitoj al vidindaĵoj kaj naciaj parkoj
- ĝuu manĝaĵon tajlandan, japanan, ĉinan kaj ekzotikajn fruktojn
- eblas aranĝi konferencojn
- favoraj prezoj
- korespondas en esperanto, angla

Petu itinerojn de

Nature Tour & Travel Co. Ltd.

Pho Thamkhajadpaikun

42 Ari Samphan 5, Rama 6 Rd

Phyathai, Bangkok 10400

Tajlando

Por pliaj informoj bonvolu kontakti:

Jack Snarberg, Johan Skyttes Väg 15,
S-554 48 Jönköping. Tel. 036-11 37 99.

Esperanto kaj komerco

De tempo al tempo aŭdiĝas voĉoj pri nesufiĉa disvastiĝo de esperanto. Iuj dubas pri la valoro de esperanto kaj de esperanto en komerco.

Pasintaŭtune mi komerce vojaĝis en orienta Azio kaj konstatis, ke ekzistas emo uzi esperanton kiel komunikilon ankaŭ inter komercistoj.

En Bangkok s-ro Pho Thamkha-jadpaikun akceptis kaj prezentis sian turisman kompanion kaj ĝian programon. Urbaj rondveturoj al vidindaĵoj miksiĝis kun komercaj vizitoj. Interesaj ekskursoj al rivero Kwai kaj al nacia parko Kho Yai, agrable varma klimato en novembro kaj esperanta ĉiĉeronado estis vere ĝuindaj.

Vizito al legom- kaj fruktomerkato estis plezuriga por la okulo kaj poste al la stomako. S-ro Pho T. informis pri la planoj akcepti turismajn grupojn kaj skizis kulturen programon. Hodiaŭ la planoj realiĝis kaj s-ro Pho- T. esprimis deziron akcepti i.a. skandinaviajn karavanojn.

En Hongkongo ĉiam estas agrable renkonti mian malnovan amikon Wang Ling Kai kaj liajn familianojn kaj ĝui ĉinan manĝaĵon laŭ abunda menuo.

En ĉina ekonomia zono

La ekonomian zonon Ŝen Ĝen oni atingas post unuhora marvojaĝo de Hongkongo. S-ro Koralo modele organizis dusemajnan restadon en Ĉinio. Vigla aktiveco ĉie, kaj komercistoj ne hezitas kiam ajn en la tago prezenti siajn varojn kaj entreprenojn. Pri tio atestas 90 ricevataj nomkartoj.

La fakto, ke ni uzis esperanton, estis tute natura afero eĉ se la koncerna persono mem ne parolis ĝin. (La tutlanda televida kurso vaste konigis la lingvon.) S-ro Du Shouke akompanis al Guangzhou (Kantono), kie dufoje jare okazas la fama kantona foiro, pri kiu haveblas informilo en esperanto.

Vizitoj al entreprenoj kaj vizitoj

de komercistoj de mateno ĝis malfrua vespero kaj komercaj interparoloj dum bankedoj ne ebligas ripozon. Esperantistoj ne riskas tedajn, solecajn vesperojn en la hotelĉambro, ĉar ĉie venis esperantistoj por konversacii kaj foje dekduo ariĝis en la ĉambro. Mi maltrafis kunvenon aranĝitan de s-ro Liu en Kantono pro miskompreno ĉe la flugkompanio. Ni havis biletojn sed ne sidlokojn.

En Hainan kaj Qingdao

Pri la insulo Hainan en la sudo mi nenion sciis kaj kun granda scivolemo mi descendis la aviadilon en Haikou. S-ro Xiao Fujun kune kun anoj de la loka esperantoklubo akceptis kun floroj. La praktikaj aranĝoj estis jam pretaj: hotelĉambro, vizito al fabriko kaj al urbaj aŭtoritatoj.

Vigla konstruado en la provinca ĉefurbo Haikou, ĉar la insulo nun

estas en rapida disvolviĝo. Primitiva vojo al la plej suda loko San Ya, kiu allogas turistojn per belaj plaĝoj, palmoj kaj luksa hotelo.

De 30-grada varmo al frosta Qingdao, konata kiel la verda urbo. La urbo estas konata ankaŭ pro forta esperanto-organizo kaj tie okazos la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en aŭgusto 1992.

S-ro Wei Bing kaj f-ino Chen Wen detale organizis mian viziton i.a. al la horloĝfabriko, kiu produktas la popularajn "esperanto-horloĝojn". Streĉa sed interesa programo finiĝis en hotelo, kie la urbestro kaj direktoro Wang invitis al bankedo kaj prezentis la komercan vivon de la urbo kaj esprimis deziron pri komerca kunlaboro.

Ŝajnas al mi ke la komercistoj estas pretaj uzi esperanton pro ĝia facileco kaj evidentas, ke esperanto devas disvastiĝi en turismo kaj komerco. Necesas eldoni faklibrojn (vortaron-lernolibron-frazaron kun sonbendoj) por amasvendado en foiroj, ekspozicioj, turismaj kaj komercaj entreprenoj. Tia libro serĉas aŭtoron.

Jack Snarberg

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Volumo 2: E-Ĵ

Aperis la dua volumo de tiu ĉi grava verko de Ebbe Vilborg.

Nepra por ĉiu lingve interesata esperantisto.

Prezo: 95 SEK

Mendu ĝin ĉe:

Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö

Junularkongreso en Karlskoga

Junuloj el la tuta mondo faris grandan rondon sur la herbejo ekster la popolaltlernejo de Karlskoga. Ili lernis kelkajn el la plej facilaj infanaj dancoj de Svedio. Ili dancis rondon, kuris kune al la mezo de la rondo, kuris denove eksteren tiel ke la ringo estis same granda kiel la herbejo. Poste kuris "longan dancon", kaj lernis kiel fari spiralon ĉirkaŭ la gvidanto en la mezo, poste ellasis la gvidanton kaj iom post iom denove formis grandan ringon.

La sveda popoldanc-grupo lerte instruis tiujn simplajn ludojn, post kiam ili mem montris verajn popoldancojn. La tuta aro da junuloj restis sur la herbejo post la fino de la

zo por la plejparto el la partoprenantoj.


"Kuru kuru" nomiĝas freneza ludo. Kiu teamo alportas la plej multajn dorsosakojn en la daŭro de mallonga minuto? La dorsosakoj estas en la dormejoj, kaj preskaŭ ĉiuj partoprenantoj havas dorsosakon. La dormejoj estas je distanco de kuro, se necesas. Dum ludo necesas! Kiel oni ebriiĝas sen alkoholo – jes, per tio, ke oni alkuras al bastono aŭ ĝardena ilo, metas la frunton suben al la tenilo, kaj rondiras ĝin kvin fojojn. Tion necesas fari rapide, ĉar la teamoj atendas kaj volas esti plej rapidaj. Sed la reen-iro al la teamo ne estas facila, post tiu kap-

kaj Sabira Stålberg pri la esperantomovado en Azio estis la plej interesa. Joachim Werdin kunportis videfilmon, kun intervjuoj de aktivuloj en elektitaj lokoj de Azio. Li uzis la filmon laŭ pecoj, kaj komencis per tio, ke li mem rakontis iom pri tiu urbo kaj tiuj homoj kiujn ni vidos en la filmo, kaj poste montris tiun pecon de la filmo. La prezento fariĝis persona, kvankam ĝi enhavis pretigitan materialon. Krome, la filmo estis bone farita, konsiderante la malfacilajn cirkonstancojn de la filmado en hejmoj kaj en klubaj kunvenejoj sen helpiloj de studioj. Al mi ankaŭ frapis la fakto ke en Azio necesas tiu malnova simbolo de la kvinpinta verda stelo, ekzemple super la enirejo de la malgranda domo en la malgranda strato de urbo en Pakistano. En Eŭropo ni tro facile forjetas kaj ŝanĝas simbolon, supozante ke la informfluo pri la ŝanĝo ĉie estas same efika kaj rapida kiel ĉe ni.

Kunsidoj de la komitato de TEJO estas grava parto de la kongresa programo, sed okupas tamen malgrandan aron el la homoj. TEJO decidis pri nova estraro, kun nova prezidantino Saskia Idzerda el Nederlando. Ŝi estas studentino pri matematiko, 21-jara, kaj krome membras en tiu teatra grupo kiu prezentis "Puphejmon" la semajnon poste.

Mark Fettes faris bonan serion da prelegoj pri Unesko, pri la rolo de la esperantomovado hodiaŭ, kaj ankaŭ prezentis sian projekton "Monda kunagado". Pri mondaj movadoj kaj pri la kontaktoj de TEJO kun aliaj organizaĵoj prelegis Anna Ritamäki kaj Katrin Matusch.

La intereso de svedaj amaskomunikiloj estis bona, se oni rigardas la plej proksimajn ĉirkaŭaĵojn de Karlskoga, parte pro tio ke la ordinaraj esperantokursoj de la popolaltlernejo ricevas atenton ĉar la instruisto Lars Forsman kutimas bone informi pri ili. La infana novajpro-



La komitato de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) konsistas el reprezentantoj de ĝiaj landaj sekcioj, kaj ĝi estas tiu organo, kiu faras la decidojn. (Fotis U Luin)

prezento, provis denove fari tiun densan spiralon sed sen helpo de la gvidanto, kaj nodis sin mem tiom ke ili ne sciis (aŭ ne volis) eliri el ĝi. En la hela sed iom malvarma somera vespero de la nordo, ili restis starantaj tie sur la herbo, babilantaj kaj saltantaj kaj kantantaj. Poste finfine venis en la domon por la vespera programo, kiu ne povis komenciĝi pli frue ĉar mankis publiko.

Ludoj, danco, babilado estas gravaj okupoj kiam junuloj renkontiĝas. Kiu diris, ke oni devas kunsidi por senti sin kongresanta? Junulara esperanto-kongreso temas pri amu-

turniĝo la tero ne plu ŝajnas plata, kaj la direkto ne estas plu rekta.

La internacia junulara kongreso (IJK) de Karlskoga kolektis ĉirkaŭ 200 junulojn, en la pasinta julio, malgraŭ la fakto ke Svedio estas terure multekosta lando. La partopreno el Sovetunio estis pli nombrola je pli fruaj similaj aranĝoj en Svedio, sed la problemoj pri vizoj kaj burokrataĵoj estas daŭre sama. Unuopaj partoprenantoj venis el Azio, sed el Afriko nur unu, pro samaj kaŭzoj: mono kaj vizoj.

El la seriozaj programeroj, komuna prelego de Joachim Werdin

gramo de la sveda radio sendis ĵurnaliston, kiu produktis unu el la kvinminutaj eroj de la tiusemajna elsendo.

Muziko okazis ĉefe en la vesperaj programoj, kaj tie ĝojige multe. La rokbando "Persone" ĉeestis kaj faris koncerton, kaj same faris la nova versio de la grupo "Amplifiki". Je la fino de la semajno estis koncerto de la tre ŝatata duopo Ŝomart kaj Nataŝa. Se la publiko decidus, ili ne rajtus fini la koncerton – nur kiam ili promesis denove kanti ĉe la lignofajro nokte, la aplaŭdoj ĉesis.

Pri tiu ĉi plaĉa tutsemajna aranĝo respondecis ĉefe la kuraĝa grupeto de Camilla Persson, Lotta Alm-

qvist, Helena Englund kaj Mona Pettersson. Kompreneble granda parto el la ĉeestantoj iel helpis, per kolekto de manĝkuponoj aŭ verkado de la ĉiutaga amuza bulteno aŭ aranĝo de ludoj aŭ prizorgo de la kafejo aŭ libroservo ktp, sed la kvar virinoj en la kongresa komitato meritas la ĉefan honoron pro la sukceso.


Venontjare okazos junulara kongreso en Montrealo en Kanado. Estos interese vidi ĉu la grupo da biciklantoj, kiuj alvenis al tiu ĉi kongreso en Karlskoga, sukcesos ankaŭ alveni al Montrealo.

Ulla Luin



Lotta Almqvist – unu el la kvar virinoj, kiuj kuraĝis aranĝi tiun internacian junularan kongreson, malgraŭ la problemoj pri kostoj.

Krucvortenigmo



Horizontale:

- Ĝojigas nin per sia voĉo
- Komenco – Rifuze
- Ne nia – Ornamaĵ'
- Necesaĵ' en fotoaparato – Ĉelo
- Sufikso de participo – Musteloj kun nigraj vospintoj
- Estigon
- Bruteja – Teenhavaĵ'

- Areo ĉirkaŭ punkto – Duona muŝ' misskribite
- Malveran – Inklina
- Frakcio – Potenca ĉasist' en la Biblio

Vertikale:

- Lignogravuristo
- Forta vir' – Grupan

- Urb' kun vidvino Biblia – Buleto el viando
- Atente laboros por trovi
- Sufikso de participo – Veran
- Kondamnita urbo – Pronomo
- Okazaĵ'
- Skribfluidaĵon – Spac' super la nuboj
- Nova vorto
- Centonoj de krono – Rifuzad'

Kompilis: Lennart Persson

Solve de la enigmo en La Espero 3/1991:

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	P	R	I	N	T	E	M	P	O	N
2	R	E	T	U	R	N	O		R	E
3	E	V	A	K	U		R	I	D	A
4	D	I	L	E	T	A	N	T	O	J
5	I	Z	O	T	O	P	A		N	
6	K	O	N	O		A	N	T	E	N
7	A	R			K	R		R		E
8	N	O	M	I	N	A	T	I	V	O
9	T		A	G	A	T	O		O	N
10	A	P	R	I	L	O	N		J	A

La mondaj religioj

Esperantistoj renkontas homojn el multaj landoj. Tial estas grave scii la korektajn terminojn por diskuti pri diversaj religioj. La celo de tiu ĉi artikolo ne estas doni superrigardon pri la instruoj kaj kulto de la mondaj religioj, sed nur instrui vortojn, kiuj estas necesaj por simpla diskuto.

En okcidento

La okcidentaj mondaj religioj estas monoteismaj (*monoteistiska*). Ili instruas ke la mondo ne ĉiam ekzistis, sed ke Dio kreis ĝin kaj ke la mondo iam pereos kaj nova mondo ekestos. Ili ankaŭ atentis la rilaton inter bono kaj malbono.

Jud(a)ismo estas la plej malnova el la okcidentaj mondaj religioj. Ĝi estas etna religio de la hebrea popolo, kaj ekestis kun Abrahamo (ĉ. 2000 a.K.) kaj Moseo (ĉ. 1200 a.K.). Esenca por judaismo estas la ideo pri interligo (*förbund*) inter Dio kaj la hebrea popolo. Judaismo do ne estas misia (*missionerande*). Oni ne volas varbi novajn judojn, sed ĉiu, kiu havas judan patrinon, estas konsiderata judo. La sankta libro de judaismo nomiĝas *Tora* (*tora*). Tio ordinare signifas la kvin unuajn librojn de la Biblio; iam la tutan libron, kiun la kristanoj nomas Malnova Testamento. Por la dua signifo judoj iam uzas la vorton Biblio. Juda preĝejo nomiĝas sinagogo (*synagoga*).

Kristanismo origine estis juda sekto. Ĝi ekestis kun la profeto Jesuo (ĉ. 4 a.K.–33 p.K.). La esenca ideo de kristanismo estas, ke Jesuo Kristo estas Dio mem, kiu en-karniĝis. Kristanismo estas misia religio. Ĝi nun estas la plej granda religio, kun la plej multaj anoj en Sudameriko kaj Afriko. Oni ne povas naskiĝi kiel kristano, sed fariĝas kristano per bapto kaj konfeso. La sankta libro de Kristanismo estas la Biblio, kiu konsistas el Malnova kaj Nova Testamentoj. Kristana preĝejo nomiĝas en esperanto simple preĝ-

ejo (*kyrka*).

Islamo ekestis kun fortaj juda kaj kristana influoj kun la profeto Mahometo (570– p. K.) Gravaj elementoj en islamo estas, ke Mahometo estas la profeto de unusola dio, kaj ke la sankta skribaĵo Korano estas kopio de originalo en la ĉielo. Oni povas fariĝi islamano per deklamo de la islama kredkonfeso. Ankaŭ islamo estas misia religio. La plej multaj islamanoj (*muslimer*) loĝas en Indonezio, Pakistano kaj Hindio, ne en iu araba lando, kiel kredas multaj eŭropanoj. Islama preĝejo nomiĝas moskeo.

Nova monda religio estas **bahaismo**, kiu ekestis en Irano kun Bab (1819–1850) kaj Bahauallah (1817–1892). Bahaano oni fariĝas akceptante Bab kaj Bahauallah kiel profetojn. La bahaanoj opinias, ke tiu religio estas la plenumigo (*fullbord*) de la promesoj de ĉiuj aliaj religioj. Bahaanoj loĝas dise en la mondo, kaj la preĝejoj de la religio nomiĝas temploj. La religio havas multajn diversajn sanktajn skribaĵojn, kaj montras intereson pri internacia lingvo.

Inter la okcidenta kaj la orienta grupoj troviĝas **zoroastrismo** (parsiismo), fondita de Zaratuŝtro (Zoroastro), kiu laŭ multaj sciencistoj vivis iam inter 1400 kaj 1200 a.K. La religio baziĝas sur instruoj pri la konflikto inter la bona Ahura-Mazdao kaj la malica Arimano. Zoroastranoj loĝas precipe en Irano kaj Hindio, kie ili nomiĝas Parsioj. Ĝi havas la samajn radikojn kiel hinduismo, sed forte influis la okcidentajn religiojn. Tial ĝi estas konsiderata okupi mezan lokon inter la grupoj. Ĝia sankta libro estas *Avesto* (*Avesta*). Ĝiaj preĝejoj nomiĝas fajro-temploj.

En oriento

La orientaj mondaj religioj estas tre malsimilaj inter si. Laŭ Hinduismo kaj Budhismo la mondo estas eter-

na. Ĝi neniam kreis kaj ĉiam ekzistis. En Ĉinio kaj Japanio estas tute ordinara afero aparteni al pluraj religioj. Japano povas ekzemple esti kaj budhana kaj ŝintoano. Tute natura afero estas, ke japano trapasas naskiĝ-ceremonion en ŝintoa templo kaj entombiĝas en budhana templo, iam li ankaŭ edziĝas en kristana preĝejo.

Hinduismo estas etna religio, kiu ekestis per kunfandiĝo de la hind-eŭropa arja religio kun ne-ariaj religioj, kiuj ekzistis en Hindio antaŭ la alveno de la arjoj. Hinduismo konsistas el multaj tre malsamaj skoloj, kiuj tamen ĉiuj agnoskas (*erkänna*) la Vedojn (*Vedaböckerna*) kaj la Upaniŝadojn (*Upanishaderna*), kiuj estas la sanktaj libroj de la religio. La plej multaj skoloj estas politeismaj (*polyteistiska*), t.e. agnoskas plurajn diojn. Esenca en multaj skoloj estas la lukto por ke la homo atingu liberiĝon de renaskiĝoj. Gravaj estas ankaŭ la oferoj en la temploj.

El hinduismo ekestis **Budhismo**, fondita de Budho, kiu laŭ multaj sciencistoj vivis ĉ. 350 a.K. Same kiel hinduismo, ĝi havas instruojn pri la liberiĝo de renaskiĝoj. La stato de tia liberiĝo nomiĝas nirvano (*nirvana*). La origina budhismo estis ateisma (*ateistisk*). Nuntempe tamen ekzistas pluraj politeismaj skoloj, kiuj transprenis popolajn diojn. Budhanoj ekzistas precipe en orienta Azio. Budhanoj kolektiĝas en temploj kaj ĉe stupaoj (*stupor*), sonorilformaj relikvejoj. **Jainismo**, fondita de Mahavira (599– a.K.) estas simila al Budhismo.

Konfuceanismo, fondita de la ĉina filozofo Konfuceo (551–479 a.K.) ne estas religio, sed filozofia kaj morala sistemo. Ĝi forte influis Ĉinion kaj Koreon. **Taoismo**, fondita de Laŭzio (379– a.K.) kunigis la popolan ĉinan religion kun filozofiaj instruoj pri tao. Tao rilatas al harmonio en la mondo. Taoanoj havas templojn.

Ŝinto (ŝintoismo) estas la indiĝena (*inhemsk*) japana religio, kiu konsistas el kulto de dioj kaj spiritoj. Ĝi havas nek fondinton, nek sanktan libron, sed evoluis de generacio al generacio kun buŝaj tradicioj.

Unu el la sektaj de ŝintoo estas Oomoto, kiu uzas esperanton kiel internacian lingvon. Ŝintoanoj kolektiĝas en temploj.

Apud la mondaj religioj

Krom la menciitaj religioj en kelkaj regionoj ekzistas ankaŭ naturaj aŭ senskribaj (*skriftlösa*) religioj. Ili estas tre malsimilaj inter si.

Ateistoj estas anoj de ateismo, kiuj neas la ekziston de Dio aŭ dioj. Precipe en Francio ili ofte nomas sin liberpensuloj (*fritänkare*), sed tiu termino estas evitenda en esperanto.

Leif Nordenstorm

Kelkaj konfuzaj nocioj

Judo estas ano de la juda religio; **hebrea** aŭ **izraelido** ano de antikva semida gento; **israelano** civitano de la moderna ŝtato Israelo. Do ekzistas israelanoj, kiuj estas palestinanaj kristanoj aŭ islamanoj.

Bramo estas unu el la hinduismaj dioj; **bramano** hinduisma pastro; **brameno** nepersona principo de la mondo laŭ hinduismo.

Por komencantoj

Agado E3: Esperantistoj helpas blindulojn

Agado E3 estas projekto por solidarecon kun homoj blindaj kaj malforte vidantaj. Ĉar d-ro Zamenhof estis okulisto (*ögonläkare*) estas natura afero ke esperantistoj helpas blindulojn.

Agado E3 komenciĝis en 1966. Ĝin iniciatis. La nederlandano Jacques Tuinder petis la esperantistojn kunlabori por "esperigi esperantojn" (*uppmuntra hoppfulla*). Agado E3 neniam fariĝis granda organizaĵo. S-ro Tuinder ĉion aranĝas apud sia ordinara laboro en sia libertempo. Ĉiu esperantisto povas libere agadi (*verka*) en sia lando. Administranto librotenas; blinda samideano (*meningsfrände, esperantist*) konsilas. Ĉiu-jare du personoj kontrolas la administracion.

La enspezoj (*inkomster*) de Agado E3 estas libervolaj donacoj de esperantistoj kaj aliaj homoj de bona volo. Agado E3 klopodas monigi artiklojn donace senditajn el Orienta Eŭropo.


En multaj landoj

Jen resumo de jam realigitaj (*förverkligade*) kaj ankoraŭ kurantaj (*pågående*) projektoj:

Acoroj: Konkreta helpo al instituto por pluroble (*på många sätt*) handikapitaj infanoj.

Ganao: Daŭra subtenado al tri optikaj laborejoj per maŝinoj, instrumentoj, lensoj, muntumoj, kaj simile.

Hindio: Helpo al vid-handikapi-



toj sub la zorgo de Patrino Teresa kaj same al la Social-Medicina Centro Nandanagar.

Kameruno: Kompleta okulkliniko interne de ekzistanta malsanulejo.

Kenjo: Veturanta (*resande*) kliniko; diversmaniera helpo al bone funkcia okulhospitalo i.a. per instrumentoj kaj fakliteraturo; pliampleksigo (*utökning*) de porblinda lernejo/infanĝardeno.

Malavio: Veturanta okulkliniko.

Nikaragvo: Brajl¹presejo kaj Centro por laborkapablo kaj moviĝtrejnado.

Pollando: Okuloperacio en Nederlando de blinda knabo kaj elektra rulseĝo por invalida samideano.

Vjet-Namo: Financa kontribuo por starigi farejojn de artefaritaj okuloj.

Cetere: Ĝenerala helpo al lernejoj kaj malsanulejoj en la Tria Mondo. Subvencioj por la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (1988) kaj Esperanta Antologio brajle eldota.

Novaj projektoj:

Kameruno: Subteno al iniciatoj efektiviĝi oftalmologian fakultaton en Kameruno, prefere kun la specialismo 'riverblindeco'.

Nikaragvo: Helpo al kristana muziklernejo en Managua, i.a. per aŭtobuseto por veturigi blindajn glerantojn.

Tanzanio: Realigo kaj plifortigo de optika laboro en Bukumbi Hospitalo, Mwanza.

En la privata hejmo de Jacques Tuinder cetere troviĝas granda stoko (*lager*) da donacoj el netrangepovaj² landoj, ekz. diskoj, pupoj, libroj, manlaboraĵoj ktp. Se ili vendiĝos, la sumo sufiĉos por aĉeti novajn okulvitrojn por 25 000 homoj en Afriko. La eventuala sukceso de tiu ĉi projekto dependos de nia aĉetemo.

Adreso: Agado E3, Henegouwlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.

Konto: Rabobanko 10.73.00.990. Nederlanda poŝtbanko 10 20 100.

¹ Braille, blindskrift

² Land med icke-konvertibel (icke växlingsbar valuta).

Pri esperanto en Nationalencyklopedin

Kun granda intereso ni malfermis la kvinan parton (dio-et) de la nova sveda enciklopedio Nationalencyklopedin por legi la artikolon pri esperanto. Montriĝis ke la artikolo estas dukolumna. Ĝi enhavas informojn pri la strukturo, historio, disvastigo kaj originala literaturo. La artikolo montras pozitivan sintenon de la verkinto. Hartmut Trauttmüller, la verkinto, estas docento en la Stokholma universitato kaj instruas i.a. interlingvistikon.

Televizie, radio- kaj magnetofone en Västerås

La klubo en Västerås membriĝos en asocio por loka televizio en Västerås. Tio signifas ke VEK rajtos sendi videofilmojn per la televida reto de la klubo kaj uzi redaktĉambrojn.

Jam de longe la klubo dissendas proksimradiajn programojn. Novaĵo estas, ke esperantistoj ekster Västerås nun rajtas pruntepreni sonkasedojn kun la proksimradiaj programoj. Telefonu al Wim Posthuma: 021-13 35 29.

La klubo sendis al sia amika esperantoklubo en Tanga, Tanzanio, monon por aĉeti kasedan magnetofonon. La esperanto-kluboj en Tanzanio interŝanĝas kasedojn inter si. Tial ili bezonas ĝuste magnetofonon. Havi amikan esperanto-klubon en evolulando estas bona ideo ankaŭ por aliaj kluboj.

Laŭ La VEK-a GAZeto 2/1991

Solidarservo en Kungälv

La klubo en Kungälv organizis solidarservon. Ili kolektas skribmaterialon, ludilojn kaj uzitajn vestojn, kaj sendas tion al esperantogrupejo en Zairo kaj Tanzanio kaj al la esperanta infanvilaĝo Bona Espero en Brazilo.

Laŭ Medlemsbrev 1991:3



Kluboj Cent kaj Mil

(Daŭrigo de paĝo 50) Jam delonge ekzistas Klubo Cent, kiu estas ebleco por SEF-anoj mone subteni sian federacion per cent kromaj kronoj ĉiujare. Nun ekzistas ankaŭ Klubo Mil, kiu ricevis siajn unuajn du membrojn:

Klubo Cent: Åke Palm, Malmö 100. Leif Holmlund, Skellefteå 100. Ivar Andersson, Tranås 100. K E Esterner, Ljungskile 100.

Klubo Mil: No 1: Sven Möllestad, Helsingborg 1000. No 2: Brita kaj Arne Andersson, Halmstad 1000.

Ingen skatt på bankränta

Kassörerna i Sveriges esperantoföreningar (och andra föreningar) bör före årsskiftet i god tid uppmärks-

samma att pengar, som föreningarna har insatta på bank, ej beskattas.

Som bekant innebär det nya skattesystemet att på bankränta utgår från 1 januari i år 30 % skatt. Bestämmelsen gäller dock endast privatpersoner. Föreningar och organisationer skall ej betala denna skatt. För att slippa skatten måste föreningen underrätta sin bank. I vissa fall kräver banken att föreningen upplyser om sitt organisationsnummer. Ett sådant nummer kan man erhålla med hjälp av lokala skattemyndigheten.

Börje Andersson

Esperanto 100 år i Göteborg

"I februari 1892 bildades den första esperantoklubben i Göteborg". Den notisen i en gammal tidning blev till en tanke och ett beslut: "Det skall vi fira!" Och det skall vi göra sista veckan i februari 1992, Internationella vänskapens vecka, på olika sätt. Vi har bl a inbjudit Junusov Abdurĥimer från Dagestan i Sovjet att medverka. Han är en 43-årig TV-journalist, chefredaktör för TV i Dagestan och också mångårig esperantolärare.

Till jubilee tänker vi också skriva en historik över Göteborgs 100-åriga esperantohistoria. Vi läser gamla tidningar och protokoll och lyssnar på personliga minnesbilder. Det är svårt att hitta, så därför ber vi er alla om hjälp.

Vi försöker nå er alla, som kan bidra till esperantos historia i Göteborg, inte bara SEF:s, utan också SLEA:s, KELI:s, ILEI:s m fl. Vi vill veta hur språket kom till Sverige och Göteborg. Dessutom vill vi ha data om olika klubbar som verkat i Göteborg under åren. Speciellt intressant är protokoll och årsberättelser, klubbtidningar m.m. Hör av er fortast möjligt till Märtha 031-57 11 33, till Inga 031-15 57 23, eller till Christer 031-31 20 78.

Jubileumskommittén

UMEA- kuracejo en Pollando

Universala Medicina Esperantista Asocio organizis centron pri orienta medicino en Pollando. Ĝi aplikas "orientan specialan diinan masaĝon", akupunkturaron, ĉinan masaĝon, klasikan masaĝon ktp.

Honore al la eksprezidanto de UMEA, d-ro Hideo Shinoda, ĝi nomiĝas **UMEA Shinoda-kuracejo**. La adreso estas: **ul. Centralna 342, PL-31-586 Kraków, Pollando**. Skribu por havigi informojn aŭ por mendi kuracadon kaj malmultekostan loĝadon.

Unu organizaĵo en Germanio

La esperanto-organizaĵoj de FR Germanio (Germana Esperanto-Asocio) respektive Germana DR (Esperanto-Asocio en Kulturligo) nun kuniĝis al unu organizaĵo, kiu transprenis la nomon de la antaŭa okcidentgermana organizaĵo. Simila kuniĝo okazis inter la junulaj sekcioj.

En orienta Germanio oni fondas ankaŭ regionajn organizaĵojn por la landoj. La 16-an de aprilo oni fondis Esperanto-Asocion por Meklenburgo-Antaŭpomerio en Stralsund. Partoprenis ankaŭ Inga kaj Evert Rausek kaj la familio Svenonius el Malmö.

Rekordo en Jyväskylä

Fariĝis rekordo da partoprenantoj en la ĉi-jara somera kurso ĉe la universitato de Jyväskylä. Certe estos nova rekordo en la venontjara jubileo. Du famaj instruistoj: Eva Farkas kaj Andrzej Pettyn. Ambaŭ estas bone konataj de svedoj per la radio-elsendoj de Budapeŝto kaj Varsovio. La programo entenis kvar

gravajn punktojn: Instuado de esperanto en pluraj niveloj; diskutoj pri diversaj temoj; literatura prezentado (Kalevala, Muminvalo, La Struvelpetro, Pipi Ŝtrumpolonga); aŭskultado de sonbendoj el la riĉa trezoro de Andreo, kun paroloj ek de Zamenhof kaj Waringhien ĝis Tonkin kaj Lennart Åberg.

Kompreneble ni havis mirindan vesperon en la lagoriĉa regiono kun saŭno, folkloro muziko kaj rostitaj kolbasoj. Tre ĝojiga estis la grandnombra partopreno de junaj komencantoj.

Ingemar Nordin

UNESKO-asocio

Kiel jam menciite dum UK en Bergen, fondiĝis Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo (mallonge: Monda Kunagado). Ĉirkaŭ 60 personoj partoprenis la fondkunvenon.

Monda Kunagado celas agi per propraj interesaj projektoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, perante la ideojn de paco kaj internacia interkompreniĝo kongrue kun la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj kunlabore kun ĝi. Ĝi subtenas la starigon de kontaktoj inter UNESKO kaj la Esperanto-movado.

Por publikigi siajn ideojn kaj projektojn, Monda Kunagado eldonas la revuon "Monda Forumo", kies provnumeron ĉiu kongresano trovis inter siaj kongresaj dokumentoj. Unuaj projektoj estas preparataj kaj celas i.a. informadon pri la Monda Jardeko de Kultura Evoluiĝo, la aplikon de scioj kaj talentoj de esperantistoj por eduki unu la alian, kaj la starigon de subtenaj internaciaj kontaktoj.

Kiu ŝatus kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de "Monda Forumo" kaj la statuton, skribu al: **Märtha Andréasson, L. Tolse-
reds väg 2265, 425 42 Hisings
Kärra, Svedio**.

El letero de J Skogeklinton, Karlstad:

En La Espero 2/1991 mi legas anonceton de iu, kiu volas korespondi por pliperfektigi en Esperanto. Laŭ mia opinio oni ne povas iĝi pli perfekta ol perfekta.

En alia anonceto mi legas la frazon "Vi nur pagos la afrankojn ĝis 20 kg 35:-". Mi kredas ke la anoncinto volis akcenti, ke oni ne bezonas pagi pli ol 35:- por 20 kg. Estas ja regulo, ke prepozicio devas stari antaŭ la vorto, kiun ĝi difinas.

Respondo de la redaktanto:

Dankon por via letero. Kompreneble vi pravas pri tio, ke oni ne povas fariĝi pli perfekta ol perfekta. "Pliperfektigi" do estas nelogika vorto, kvankam multe uzata. "Pliboniĝi" aŭ "ekzerci" estas uzablaj anstataŭigoj.

La dua ekzemplo estas mallongigo de esprimo, kiu en sia tuta longo estas: "Vi nur pagos la afrankon por paketo ĝis-20-kilograma, nome 35 kronojn." En anoncetoj oni ordinare mallongigas por ŝpari lokon kaj monon. Tiel verŝajne faris la anoncinto.

Leif Nordenstorm

Respondo de Zamenhof:

"...Krom tio ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo; tial ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta."

El **Zamenhof**: "Pri mia stilo" en *La Revuo*, oktobro 1907 (Represita en *Lingvaj respondoj*)

Recenzoj

Cao Bailong kaj Zhang Qingshen: Antikvaj Ĉinaj Sciencistoj. Elĉinigiĝis: Dai Songen kaj Xue Meixian. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1990. 134 p. 32 kr.

Post 5000 jaroj en Ĉinio, Ĉinaj tradiciaj festoj, Antikvaj Filozofoj de Ĉinio (LE 1990:1) nun aperis Antikvaj ĉinaj sciencistoj, ankoraŭ unu libro, kiu ebligas al la leganto pliprofondiĝi en la historion de Ĉinio.

En popularscienca stilo la libro konatigas la legantojn kun medicinistoj, matematikistoj, farmakologoj, geografoj, astronomoj kaj la inventistoj de papero kaj tipografio kaj aliaj. La laste menciita ne estas, kiel mi kredis, Gutenberg, sed Bi Sheng. La tekston akompanas tradicistilaj ĉinaj desegnaĵoj. Interesaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri historio kaj/aŭ pri scienco.

Ni kune ludu; Mi estu patrino & Bona Baobao. Diversaj verkintoj. Elĉinigiĝis: Dai Song'en. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1990. Po ĉ. 20 p. Po 13 kr.

La libroj estas uzeblaj por 2–8 jaroj. La esperanta traduko estas pli flua ol tiu de ĉinaj infanlibroj de la 70-aj kaj 80-aj jaroj. Tamen iom abundas participoj, kiuj malfaciligas la komprenon de la infanoj. La libroj estas moralinstruaj, ĝenro kiu preskaŭ mankas en la sveda infana literaturo. La libroj tamen nenion diras pri la vivo de infanoj en Ĉinio. Tio estas manko, se ni deziras konatigi niajn infanojn kun la vivo de infanoj en aliaj landoj.

Leif Nordenstorm

Amuzaj Karikaturaj. Kompilis kaj pentris: Peng Guoliang. Tradukis: Dai Song'en. Ĉina Esperanto-Eldonejo 1990. 18 p. 13 kr.

Tiun ĉi libron mi vere ŝatas. La bildstrioj estas preskaŭ tute sentekstaj, kaj uzeblaj por studrondoj. Sen ligiĝi al la teksto oni per sia propra

fantazio povas konstrui frazojn kaj tutajn rakontojn pri la bildoj. Vere paroliga libro.

Kaisa Hansen

Reto Rossetti: Arto kaj naturo. Eseoj. Hungara Esperanto-Asocio 1989. 126 p.

Se vi iam bone ridis pro anekdoto, vi verŝajne ne konsciis, ĉu vi ridas pro elipso, logika konsekvenco, duflanka gloso, troigo aŭ du sencoj de la frazo. Leginte la eseon "La komikaj rimedoj" en Arto kaj naturo vi des pli konscias. En la eseo la verkinto analizas kaj priskribas la parolrimedojn de la komiko. Ankaŭ "Ĉu ekzistas internacia humuro?" kaj kelkaj aliaj eseoj traktas humuron. Apud tiuj aperas eseoj pri arto kaj literaturo. Aparte menciinda estas la 26-paĝa "Spegulo de esperantaj stiloj" kun esploroj de la stiloj de

20 esperantaj verkistoj. (Naturo tamen estas pritraktita nur en rilato al arto.)

Arton kaj naturon mi rekomendas al ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri humuro kaj/aŭ literaturo. Ĝi estas inda reprezentanto de la bona esperanta esearto. La lingvaĵo estas flua kaj ne tro plena de neologismoj. La libro estas bele presita kaj enhavas multajn ilustraĵojn.

Leif Nordenstorm

István Nemere: Vivi estas danĝere. Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto 1988. 159 p.

István Nemere estas la plej produktiva esperanta romanisto nuntempa. Liaj romanoj facile digesteblas, lia lingvo estas simpla sed ne malriĉa, bona kvankam ne ekstreme eleganta. Persone mi iomete tediĝis legante kelkajn liajn romanojn, eble ĉar pluraj el ili ripetas similan temon: Solulo venas al fremda loko.

Kalendaro

Aldonoj al la kalendaroj en La Espero 1991/2 kaj /3:

SEPTEMBRO

21 – 22 **Aŭtunaj tagoj**, Tammerfors, Finnlando. (Synnöve Mynttinen, Keskussairalankatu 5 M 133, SF-15858 Lahtis, Finnlando.)

OKTOBRO

12 – 13 **Semajnfina kurso**, Helsingborg, (Ann-Christine Krondahl, tel: 044-32 51 64)

21 oktobro – 20 decembro **Daŭriga kurso**, Karlskoga Popola Altlernejo

JANUARO 1992

7 januaro – 6 marto **Kurso por komencantoj**, Karlskoga Popola Altlernejo

FEBRUARO 1992

La esperantomovado en Gotenburgo festas sian centjaran jubileon. Aperos informoj pri aranĝoj.

MARTO 1992

16 marto – 22 majo **Daŭriga kurso**, Karlskoga Popola Altlernejo

JULIO 1992

6 – 11 **Somera kurso**, Karlskoga Popola Altlernejo

18 – 25 **1-a mondkongreso de Esperantistoj Handikapuloj**, (Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, p.k. 63, CS-274 01 Slany, Ĉeĥoslovakio.

Sten Svenonius
Erikstorpsgratan 26 A
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Malmö

kun iom mistera misio. Krome Nemere emas psikologumi, sed lia kapablo por tio ŝajnas al mi nesufiĉa. Tamen, lerta metiisto li nerefuteble estas; pleje mi ĝis nun ŝatis lian "Sur kampo granita", kiu proksimas al realo.

En "Vivi estas danĝere" li bridis sian psikologumadon favore al agado kaj eventoj. Per tio li trovis kampon, kie lia talento donas pli riĉan frukton. Tiu ĉi romano apartenas al

la ago-plena agenta aŭ gangstera ĝenro. Ĉi-foje la heroo ne iras fremdloken sola, sed lin akompanas bando da kunbatalantoj. Kelkaj el ili impresas iom ŝablone, sed tio pardoneblas; plej gravas agado kaj ekscito. Ankaŭ moralon oni povas dedukti: Eĉ kiam bono venkas malbonon, ĝi povas esti infektita de la perforto uzata.


Por kredindigi la tuton, detaloj devas esti kredindaj kan konkretaj.

Nemere ne estas majstro pri tio, liaj priskriboj pri personoj kaj medioj foje impresas pale, sensuke. La forto estas konstrui intrigon kaj simple rakonti, kiel la protagonisto ŝtupon post ŝtupo plenumas sian mision. Tiel li efike sukcesas vivteni intereson kaj eksciton dum rapida disvolviĝo de eventoj ĝis ekstrema fino. "Vivi estas danĝere" estas libro leginda senpaŭze, kaj je favora juĝo.

Sten Johansson

Kiel trovi Esperanto-Centron?

En letero al SEF, Curt Bohman en Ursviken admonas nin publikigi mapon pri la situo de Esperanto-Centro. "Eĉ la policistoj sur la strato ne scias, kie troviĝas Brunnsgatan 21". Tio certe estas serioza afero. Jen do – mapo utila por policistoj kaj ĉiuj aliaj. La plej proksima metroa stacio nomiĝas **Hötorget**. El pluraj elirejoj ni indikis nur unu, la plej proksiman al EC. La stratoj Malmskillnadsgatan kaj Regeringsgatan ambaŭ troviĝas je nivelo pli alta ol Kungsgatan, kaj transiras ĝin kiel pontoj. Esperanto-Centro troviĝas ĉe Brunnsgatan, ĝuste meze inter ĝiaj kruciĝoj kun Malmskillnadsgatan kaj Regeringsgatan. De Kungsgatan al Malmskillnadsgatan oni supreniras per ŝtuparo ĉe la ponto. EC troviĝas inter la pordoj 21 kaj 21 A.



AMPLIFIKI

eldonas novan kasedon

"ĈU NE?!"

Prezo: 75 SEK

Inkludas tekstojn

Mendu de

Micke Englund

pĝ 55 11 17-6611

Lasta manuskriptdato por La Espero 5-6/1991 (dubla numero) estos la 18-a de oktobro.

La recenzo pri Orienta speciala diina masaĝo en La Espero 3/1991, p 48, estis verkita de B M Kim-Lindblom.